


Kristana Esperanto-Kongreso

72-a Kongreso
de Kristana Esperantista Ligo Internacia



5–12 de aŭgusto 2023
Bjalistoko–Kruszyniany–Supraśl–Tykocin–Wasilków

Dialogo inter religioj

Bonvenon en Bjalistoko!

Loka Kongresa Komitato



Stanisław Dobrowolski



Nina Pietuchowska



Elżbieta Karczewska




Jarosław Parzyszek



Iza Walentynowicz

Kristana Esperanto-Kongreso

72-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia



5–12 de aŭgusto 2023

Bjalistoko–Kruszyniany–Supraśl–Tykocin–Wasilków

Kongresa temo:

Dialogo inter religioj

Kongresa libro de la 72-a Kongreso de KELI

Eldonis:

Kristana Esperantista Ligo Internacia / keli.chez.com

Fondumo Zamenhof / fondumozamenhof.pl

Bjalistoka Esperanto-Societo / espero.bialystok.pl

Redaktoro: Stanisław Dobrowolski

Fotoj: Stanisław Dobrowolski, Nina Pietuchowska

Korekto: Jarosław Parzyszek

Kompostado kaj enpaĝigo: Przemysław Wierzbowski

Presita ĉe: Ars Libri, ul. Wyścigowa 31, 20-425 Lublin, Pollando

Honora Komitato

Niaj Altaj Protektantoj

Pastro Ĉefepiskopo Bjalistoka d-ro Józef Guzdek
Pastro Ĉefepiskopo Bjalistoka kaj Gdanska d-ro habil. Jakub
Podlaĥia Vojevodo Bohdan Paszkowski
Marŝalo de Podlaĥia Vojevodio d-ro Artur Kosicki
Urbestro de Bjalistoko d-ro habil. Tadeusz Truskolaski
Urbestro de Wasilków Adrian Łuckiewicz



Wojewoda
Podlaski



Honorary Patronat
Prezidenta
Miasta Białegostoku



Niaj sponsoroj – kunorganizantoj

Municipa Komunumo Bjalistoko
Marŝala Oficejo de Podlaĥia Provinco
Podlaĥia Provinca Oficejo en Bjalistoko
Municipa Komunumo Supraśl
Municipa Komunumo Tykocin
Municipa Komunumo Wasilków
Bjalistoka Kulturcentro
Podlaĥia Muzeo en Bjalistoko
Bjalistoka Publika Transporto



Mallonga historio de KELI

Jam de 1901 la franca protestanto Théophile Cart agadis por Esperanto. Li estas la aŭtoro de la fama, ofte republikigita lernolibro *L'Espéranto en 10 leçons* (Esperanto en 10 lecionoj). Sep jarojn poste la germano Paul Hübner, provanta agadi ĉe la Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj (YMCA), lanĉis la revuon kiu nun estas *Dia Regno* (1908). En la Universala Kongreso de Antverpeno (1911) fondiĝis la Kristana Esperantista Ligo, kiu poste fariĝis KELI. Aliaj gravaj datoj: 1926 – publikigo de la Esperanta Biblio; 1949 – la unua kongreso de KELI en Tostarp, Svedio; 1964 – publikigo de *Nia Historio* de Dirk de Boer; 1968 – la unua ekumena kongreso kun IKUE; 1971 – publikigo de la himnolibro *Adoru Kantante* kunordigita de Adolf Burkhardt; 2001 – publikigo de la ekumena Diservo-libro *Adoru* kaj 2020 – la unua reta Diservo.

Fondumo Ludoviko Zamenhof kaj Medalo de Toleremo


Fondumo Ludoviko Zamenhof estis iniciatita en decembro 1987 (oficiale registrita en junio 1988), okaze de la 72-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu somere okazis en Varsovio. Dum la ekskursotago Bjalistokon vizitis 1000-persona grupo de partoprenantoj de la Kongreso. La gastoj renkontiĝis kun bjalistokanoj ĉe la monumento al Zamenhof. Tiam oficiale estis lanĉita la ideo konstrui Mondan Esperanto-Centron en la naskiĝurbo de Zamenhof.

En la Statuto de la Fondumo oni deklaris jenajn celojn la ĉefaj:

- 1) konstrui Mondan Esperanto-Centron Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko, kiel monumenton omaĝe al la kreinto de la internacia lingvo Esperanto, plenumantan funkcion de studado kaj popularigado de la lingvo Esperanto kaj de internacia scienca kaj kultura interŝanĝo;
- 2) universaligi kaj subtenadi agadon servantan por la tutmonda paco kaj internacia interkompreniĝo inter homoj kaj nacioj, realigante la idealojn, kiuj estis ĉe la fundamento de la naskiĝo de la internacia lingvo Esperanto.

Kelkajn jarojn pli poste, laŭ la iniciato de Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof, la nepo de la iniciatinto de Esperanto, lanĉita estis la ideo de Medalo de Toleremo. Oni planis distingi per la medalo elstarajn personojn aŭ organizaĵojn, interalie tiujn, kiuj agas por la interkompreno kaj estimo de la diferencoj kulturaj, naciaj, seksaj aŭ religiaj. La „kapitulon” de la Medalo de Toleremo konsistigas reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj, de la urbo Bjalistoko kaj de Podlaĥia Provinco. La medalon projektis kaj produktis loĝanta en Bjalistoko bulgara artisto Dymitr Grozdew. Sur la averso troviĝas du manoj delikate tenantaj vinbranĉeton kaj la surskribo „Toleremo”. Sur la reverso videblas la vizaĝo de Zamenhof kaj la bjalistoka Branicki-Palaco, la plej fama bjalistoka konstruaĵo.

La unua Medalo de Toleremo estis enmanigita la 10-an de junio 1999 al la papo Johano Paŭlo la Dua. La medalo estis unu el la donacoj, kiujn la papo ricevis dum la interreligia kunveno en Drohiczyn. La medalon enmanigis la nepo de Doktoro Esperanto – Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof kaj la prezidantino de la Fondumo – profesorino Hanna Konopka. La dua distingito estis profesoro Władysław Bartoszewski, multjara prezidanto de Internacia Auschwitz-Komitato, eksministro por eksteraj rilatoj de Pollando. Li akceptis la medalon en Bjalistoko la 9-an de junio 2006. Samjare distingita estis per la Medalo de Toleremo la Monda Organizaĵo de la Skolta Movado. La enmanigo de la medalo okazis dum internacia skolta tendaro en Italio. En 2009 oni distingis per la Medalo de Toleremo sinjoron Jerzy Owsiak, la iniciatinton kaj prezidanton de Granda Orkestro de Porfesta Helpo, unu el la plej grandaj polaj bonfaraj fondaĵoj. La enmanigo okazis en januaro 2010 en Bjalistoko dum la finalo de Granda Orkestro de Porfesta Helpo. Dum la solena inaŭguro de la 94-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu en julio 2009 okazis en Bjalistoko,



pro la multjara agado por toleremo, kultura dialogo kaj egalrajteco la Medalon de Toleremo ricevis Fondaĵo Pogranicze (Ĉelimejo) el Sejny. La 14-an de decembro 2013, okaze de la naskiĝdatreveno de Ludoviko Lazaro Zamenhof, la Medalon de Toleremo ricevis la geedzoj Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, kiuj volontule, dum 40 jaroj, gvidas en Brazilo la Esperanto-orfejon kaj edukejon Bona Espero. La oficiala enmanigo okazis en la pola ambasadejo en Brazilio, la ĉefurbo de Brazilo.

Bjalistoka Esperanto-Societo

Bjalistoka Esperanto-Societo estas neregistara asocio fondita en 1991. Ĝi daŭrigas tradicion de la antaŭmilita Zamenhofa Esperanto-Societo fondita en 1921 de Jakobo Ŝapiro.

La 2-an de decembro 1990 dum la fondokunsido de 34 bjalistokaj esperantistoj oni decidis refondi la Societon kaj elektis Stanisław Dobrowolski ĝia unua prezidanto. Danke al la agado de Fondumo Zamenhof kaj de lokaj esperantistoj en 1995 oni renovigis la konstruaĵon de iama Sinagogo Piaskower ĉe la strato Piękna 3. Ĝis la jaro 1999 funkciis tie Informcentro Kultura kaj Turisma Ludoviko Zamenhof. Ekde 2000 en la konstruaĵo troviĝas la sidejo de Bjalistoka Esperanto-Societo kaj Fondumo Zamenhof.

La ĉefa okupo de Bjalistoka Esperanto-Societo estas popularigado de Esperanto en Bjalistoko kaj en la provinco, organizado de lingvokursoj je ĉiuj gradoj, ĉiujaraj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj, prelegoj kaj aliaj eventoj. Ĝi estis la loka kunlaboranto de UEA por prepari la 94-an UK 2009, okaze de la 150-a naskiĝdatreveno de Ludoviko Lazaro Zamenhof.


De 2009 la asocio partoprenas en eŭropaj projektoj kun diverslandaj partneroj. En majo 2017 ĝi organizis kun Pola Esperanto-Asocio la 36-an Polan Esperanto-Kongreson en Bjalistoko.

Grava parto de la agado de BES estas eldonado de originalaj libroj en Esperanto kaj tradukoj el diversaj lingvoj.


Kongresejo

La Kongreso okazos en la sidejo de la Ĉefepiskopa Supera Pastra Seminario, ĉe la strato Warszawska 46 en Bjalistoko, situanta en la urbocentro.

etaĝo -1



etaĝo 0



etaĝo 1



etaĝo 2



Programtabelo

5.08.2023, SABATO

Loko: Bjalistoko

- 18.00 Vespermanĝo
- 19.00 Malgranda konkurso de scio pri Bjalistoko (televidsalono)
 - Interkona vespero
 - Komuna preĝo – danko pro la tago bone pasigita

6.08.2023, DIMANĈO

Loko: Bjalistoko

- 7.45 Komuna preĝo – danko pro la tago ĵus komencita (kapelo)
- 8.00 Matenmanĝo
- 9.15 Festa komenco en la kunvenejo de la seminario
- 9.30 Enkonduka prelego de la prezidanto de KELI Philippe Cousson – *Relego de religio* (e-p)
- 10.30 Daniel Sjargli: *Misia agado de bjalistokaj baptistoj en Bosnio, Kenjo kaj Ukrainio* (p-e)
 - Riĉa libroservo je Via dispono
- 11.30 Protestanta diservo en la kunvenejo
- 12.00 Tagmanĝo
- 13.15 Vizito en la Centro Ludoviko Zamenhof
 - Prelego de Dariusz Szada-Borzyszkowski: *Bjalistoko en la koro de ĉiu judo en la mondo* (p-e)
 - Vizito en la moderna ortodoksa preĝejo al la Sankta Martiro Dimitro Solunski
- 16.20 Promeno tra Bjalistoko ĝis la monumento al juna Zamenhof, survoje ZEO-j
- 17.00 Katolika diservo en la blanka preĝejo apud la katedralo (e)
- 18.15 Vespermanĝo

- 19.00 Malgranda konkurso de scio pri L.L. Zamenhof (televidsalono)
- Filmo *La kazo de Kristo* (p-e)
 - Komuna preĝo – danko pro la tago bone pasigita

7.08.2023, LUNDO

Loko: Tykocin

- 7.45 Komuna preĝo – danko pro la tago ĵus komencita (kapelo)
- 8.00 Matenmanĝo
- 9.00 Tuttaga vojaĝo al la urbeto plena de hebreaj spuroj. Tie en la malnova sinagogo:
- Prelego de Jan Maciejewski: *Historio de judoj el Tykocin* (p-e)
 - Prelegoj de Eljahu Josele (p-e): *Kiel iĝi rabeno, Kial judoj ne akceptas Jesuon kiel la veran Mesion*
 - Renkontiĝo kun la urbestro de Tykocin, Mariusz Dudziński, kaj solena inaŭguro de la nova memortabulo omaĝe al la familio Zamenhof
 - Tagmanĝo
 - Promeno tra la urbeto
 - Vizito en la Eŭropa Cikonia Vilaĝo Pentowo
- 18.00 Tradicia hebrea vespermanĝo en la seminario
- 19.00 Malgranda konkurso de scio pri hebreaĵoj (televidsalono)
- Filmo *Ida* (Oscar-premio + 7 aliaj premioj) (p-e)
 - Komuna preĝo – danko pro la tago bone pasigita

08.08.2023, MARDO

Loko: Bjalistoko, Wasilków

- 7.45 Komuna preĝo – danko pro la tago ĵus komencita (kapelo)
- 8.00 Matenmanĝo
- Prelegoj en la seminario (kunvenejo):
- 9.00 Ágnes Ráczkevy-Eötvös: *Biblia Rondo* (e)

- 10.00 Jarosław Parzyszek: *Pri hilelismo kaj homaranismo de Zamenhof* (e)
- 10.30 Bengt Olof Åradsson: *La sveda sanktulino Elisabeth* (e)
- 11.00 Janusz Robioneck: *Religia vivo en la Eklezio sur la ekzemplo de la Instituto de Fratoj de Kristianaj Lernejoj* (e)
- 11.30 Gregorio Jekel: *Tradukproblemoj de Esperanto – Hebrea Biblio* (e)
- 12.00 Tagmanĝo
- 13.15 Vojaĝo al la Katolika Sanktejo Sankta Akvo en Wasilków
- Promeno kun la paroĥestro – la sankteja kuratoro pastro Alfred Butwiłowski tra la Sanktejo
 - Renkontiĝo kun la urbestro de Wasilków, Adrian Łuckiewicz, en la paroĥejo
 - Prelego de Grażyna Barszczewska-Banel: *La sanktejo Sankta Akvo* (e)
 - Prelego de Anna Mocarska: *Montoj de Krucoj en la mondo* (e)
 - Prelego de Nina Pietuchowska: *Malnovritanoj en Pollando* (e)
- 17.00 Katolika diservo/Jarkunveno de KELI
- Pikniko en arbaro
 - Malfrua reveno al la seminario (20.30)
 - Komuna preĝo – danko pro la tago bone pasigita (televidsalono)

09.08.2023, MERKREDO

Loko: Kruszyńniany

- 7.45 Komuna preĝo – danko pro la tago ĵus komencita (kapelo)
- 8.00 Matenmanĝo
- 9.00 Tuttaga vojaĝo al Kruszyńniany
- Renkontiĝo en la Islama Centro de Edukado kaj Kulturo kun Bronisław Talkowski – la prezidanto de la Islama Komunumo Kruszyńniany (p-e)
 - Prelego de la imamo Janusz Aleksandrowicz: *Kion oni devas scii pri la islama religio?* (p-e)
 - Prelego de Viviana Isernia: *Kontrasto de stereotipoj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Islamo aŭ aliaj religioj* (p-e)

- Tagmanĝo
 - Konatiĝo kun tatara ekspozicio
 - Vizito en moskeo kaj ĉe tombejo (mizar)
 - Reveno al Bjalistoko kaj tie vizito en la moskeo
- 18.00 Vespermanĝo
- 19.00 Malgranda konkurso de scio pri la islamanoj (kunvenejo)
- Koncerto de la infan-junulara tatara ensemblo Buńczuk
 - Komuna preĝo – danko pro la tago bone pasigita

10.08.2023, ĴAŬDO

Loko: Bjalistoko

- 7.45 Komuna preĝo – danko pro la tago ĵus komencita (kapelo)
- 8.00 Matenmanĝo
- Prelegoj en la kunvenejo:
- 9.00 Jarosław Parzyszek: *Protestantoj kaj la historio de la preĝejo al Sankta Adalberto en Bjalistoko* (e)
- 9.30 Jurek Jurczyński: *Malnovortodoksa lingvo en ortodoksa preĝejo ludas similan rolon kiel E-to inter esperantistoj tra la urbo* (e)
- 10.00 Oldřich Arnošt Fischer: *Adaptado de romaoj – dornoplana vojo* (e)
- 10.30 Filmo *10 jaroj de la Esperanto-Libraro* (e-p)
- Filmo *Tago de la Gepatra Lingvo* (e)
 - Filmo *Stelo de Bona Espero* de Roman Dobrzyński (e)
- 12.00 Tagmanĝo
- 13.00 Promeno tra la urbo
- 18.00 Vespermanĝo
- 19.00 Malgranda konkurso de scio pri Esperanto-Libraro (kunvenejo)
- Koncerto de la ensemblo Frey Lech Band
 - Komuna preĝo – danko pro la tago bone pasigita

11.08.2023, VENDREDO

Loko: Supraŝl

- 7.45 Komuna preĝo – danko pro la tago ĵus komencita (kapelo)
- 8.00 Matenmanĝo
- 9.00 Tuttaga vojaĝo al la Kultura Centro de Ortodoksoj en Supraŝl
- 10.00 Vizito en la Muzeo de Ikonoj (e)
- Vizito en la Akademio de Supraŝl kaj la filmo *Ĉe la fonto de la monaĥejo en Supraŝl* (p-e)
 - Gvidata promeno tra la monaĥejo (p-e)
 - Renkontiĝo kun la urbestro de Supraŝl, d-ro Radosław Dobrowolski, en la urba biblioteko (p-e)
 - Tagmanĝo
 - Promeno tra la urbo
- 18.00 Vespermanĝo en la seminario
- 19.00 Malgranda konkurso de scio pri ortodoksoj (televidsalono)
- Adiaŭa vespero – poezio de Halina Kuropatnicka-Salamon
 - Komuna preĝo – danko pro la tago bone pasigita

12.08.2023 SABATO

Loko: Bjalistoko

- 7.45 Komuna preĝo – danko pro la tago ĵus komencita (kapelo)
- 8.00 Matenmanĝo

Oni devas liberigi la ĉambrojn ĝis la 12.00 h.

5.08.2023, sabato


Historio de la urbo Bjalistoko

Kun preskaŭ 300.000 loĝantoj Bjalistoko estas la plej granda urbo de la nord-orienta parto de Pollando kaj la ĉefurbo de Podlaĥia Provinco. Ĝi funkcias kiel administra, ekonomia, scienca kaj kultura centro de tiu regiono. Ĝiaj specifaj trajtoj formiĝis en la etoso de kunvivado de multaj nacioj, lingvoj, konfesoj, kulturoj, kutimoj kaj tradicioj.

La unua skribita noto pri Bjalistoko devenas el la jaro 1514. Ĝi apartenis al la litova nobelo Raczko Tabutowicz. Poste la bienon heredis la familio Wiesiołowski. Piotr Wiesiołowski fondis en jaro 1617 la unuan masonitan preĝejon al la Plej Sankta Virgulino Maria. Post la morto de la heredantoj de Piotr Wiesiołowski la Juna, Bjalistoko fariĝis proprietajo de Pola Reĝlando kaj ekapartenis al la starostejo Tykocin. En la jaro 1661 la hetmano Stefan Czarnecki, la venkinto kontraŭ la sveda armeo dum la *sveda diluvo*, ricevis de la reĝo la starostejon Tykocin kun la vilaĝo Bjalistoko kiel sian heredon proprajon. Poste heredis ĝin Aleksandra Katarzyna, la filino de Czarnecki kaj

la edzino de Jan Klemens Branicki, kunbatalanto de Czarnecki. Ilia filo, Stefan Mikołaj Branicki, podlaĥia vojevido, konstruis en la 1670-aj jaroj en Bjalistoko sian novan sidejon. Li invitis eminentan arkitekton, Tylman el Gameren, kiu konstruis la barokstilan palacon. Tiutempe Bjalistoko akiris urban karakteron. La disvolv-

iĝon de la urbo kaj la rezidejo daŭrigis ilia filo, Jan Kazimierz Branicki, kiu omaĝe al sia avo uzis la duan nomon Klemens, la kronlanda grandhetmano, krakova kaŝtelano. En la jaro 1749 la pola reĝo Aŭgusto Saksa la Tria donis al Bjalistoko la magdeburgajn urbajn rajtojn.



Jan Klemens Branicki decidis konstrui hospitalon, arsenalon, urbo-domon, gastejon, poŝtoŝtationojn, pargarden palaceton kaj monaĥejon de Fratinoj de Mizerikordo. En urbo restadis tiam multaj artistoj, arkitektoj, kuracistoj.

La tria divido de Pollando en 1795 kaŭzis, ke Bjalistoko ektroniĝis en Prusujo. Dum tiu periodo en la urbo loĝis 4.000 homoj; preskaŭ duono el ili estis judoj. Post la falo de 1Napoleon-imperio Bjalistoko estis enigita por pli 100 ol jaroj en la Rusan Imperion.

Post la novembra ribelo (1830–1831) la cara reĝimo, kadre de persekutado, enkondukis doganlimon inter la Kongresa Reĝlando kaj la Rusa Imperio. Paradokse tio kaŭzis rapidan evoluon de la urbo. Multaj posedantoj de teksaj fabrikoj el la regiono de Lodzo migris al Bjalistoko por ne pagi doganon. Germanaj, rusaj kaj judaj fabrikistoj fondis multajn manufakturojn. En 1862 Bjalistokon alvenis la fervojo Peterburgo–Varsovio. En tiuj cirkonstancoj en Bjalistoko en la jaro 1859 naskiĝis Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo Esperanto.

Post la unua mondmilito kaj regajno de sendependeco Bjalistoko iĝis la ĉefurbo de la provinco.

Dum la dua mondmilito la centro de la urbo estis detruita en pli ol 70%. Post ĝi komenciĝis la periodo de rekonstruado kaj disvolviĝo de la urbo. En la rekonstruita palaco de Branicki oni kreis la Medicinan Akademion (nuntempe Universitato).

Oni povas viziti urbon laŭ la itineroj:

- de la familio de Branicki,
- de la bjalistokaj fabrikistoj,
- de Esperanto kaj pluraj kulturoj,
- de la ligna arkitekturo,
- de la bjalistokaj preĝejoj.

6.08.2023, dimanĉo

Bjalistoko

Prelegoj

1. Enkonduka prelego de la prezidanto de KELI Philippe Cousson: *Relego de religio*

Mi naskiĝis en dureligia franca kamparo (protestantoj apud katolikoj) kaj estis profesie lerneja bibliotekisto, nun emerita. Predikisto kaj respondeculo en protestanta paroĥo (EPUdF) en la urbo de Hilario, Poitiers. Mi ankaŭ havas rolon en la vivo de la protestanta Esperantista ligo (KELI) de multaj jaroj kaj en la interreligia dialogo en mia urbo.

Kio estas religio kaj kio ĝi ne estas. La interreligia dialogo, kio estas kristanismo, kiel kaj kial okazas la disiĝoj. Kio estas kaj ne estas ekumenismo. Loko de religio en la socia kaj politika vivo.



2. Daniel Sjargli: *Misia agado de bjalistokaj baptistoj en Bosnio, Kenjo kaj Ukrainio*



Grupestro de Studenta Servo de la Baptistpreĝeja paroĥanaro en Bjalistoko, socia aganto por edukado kaj la loka komunumo. Li ŝatas legi librojn, ŝakludi, konatiĝi kun novaj homoj kaj kulturoj. En sia kristana kredo li baziĝas ne nur je personaj spertoj, sed ankaŭ je sciencaj kaj historiaj faktoj.

Malgraŭ ke la Baptistpreĝeja paroĥanaro en Bjalistoko kreas malgrandan komunumon, konsistantan el proksimume 300 membroj, ĝi fieras pri siaj ambiciaj misioj en Pollando kaj eksterlande. Ĝi regule sendas misiistojn por mallongaj kaj longdaŭraj misioj, kaj ilia celo estas disvastigi la veron kaj esperon je la nomo de Jesuo Kristo.

La misio en Kenjo celas subtenon de loka bazlernejo – unu el multaj lokoj en la regiono, kie infanoj povas frekventi lernejon. Pli frue la lecionoj okazis subarbe, sen ajna ekipaĵo. Dum unu jaro oni sukcesis konstrui lernejon kun sanitaraĵoj i.a. danke al granda subteno el Bjalistoko. Regule la lernejon vizitas reprezentantoj de la bjalistoka baptista komunumo, kiuj tie, kiel gastoj, i.a.: instruas la anglan, gvidadas praktikajn metiejojn, konstruis la ludejon por infanoj, alportis librojn kaj ilojn necesajn en la lernejo. En la vizitanta grupo estis ankaŭ kuracisto, kiu zorgis pri vundoj kaj aliaj kuracbezonoj de la mizeraj lokanoj.

La komunumo de Baptistoj el Bjalistoko finansas ankaŭ 2 misiistinojn, kiuj servas en lokaj preĝejoj en Bosnio kaj Hercegovino. Pro etnaj kaj religiaj konfliktoj, rezultantaj el la lasttempa regiona milito dum la jaroj 1992–1995, la misia agado en Bosnio estas tre malfacila. Krome la loka komunumo en Tuzla aktivas kaj realigas siajn celojn predikante la Evangelion de Jesuo Kristo kaj subtenante la lokanojn per integrigaj kaj edukaj iniciatoj. Pli frue la baptistoj servis ankaŭ por la fuĝintoj el Afriko kaj Azio.

3. Dariusz Szada-Borzyszkowski: *Bjalistoko en la koro de ĉiu judo en la mondo*

Li estas teatra kaj televida reĝisoro. Dum multaj jaroj li estis eldonisto de televidaj programoj, i.a. „Białystok – Kiriāt Białystok” en TVP Polonia pri iamaj juddevenaj loĝantoj de Bjalistoko. Li laboras en la Galerio de Slendzinski-Familio – Galerio de Juda Kulturo. Li estas ankaŭ membro de la Asocio de Polaj Filmistoj kaj Vicprezidanto de la Asocio de Amikoj de Juda Kulturo en Bjalistoko, kiu agas por restarigo de memoro pri la iamaj loĝantoj de Bjalistoko. Li komencis kunlaboron kun la Asocio de Jud-Kristana Dialogo „Shomer International” en Belorusio. Li estas kunorganizanto de multaj aranĝoj, kiuj celas prezenti la judan kulturon al la loĝantaro de la regiono.



La intermilita Bjalistoko estis urbo grava kaj plena de diverseco, sendube unu el la plej gravaj centroj de la socia, anima, ekonomia kaj arta vivo de la polaj judoj. En la urbo funkciis multaj diversfakaj lernejoj, en kiuj oni uzis diversajn eduklingvojn. Ekzistis tie preskaŭ 100 sinagogoj kaj preĝdomoj. Aktive prezentis sin la artista medio. Aktivis diversaj judaj organizaĵoj kaj partioj, judaj sportaj kluboj kaj asocioj de karitato. Ni ne povas eĉ imagi tiujn aktivaĵojn. Aparta rakonto devas esti pri judaj festoj: kaj pri ĉiusemajna Sabato kaj pri aliaj festoj de rabenoj. Pri la unikeco de Bjalistoko en la konscio kaj memoro de la judoj pravas la fakto, ke la multaj bjalistokaj judoj, kiuj transvivis la Holokaŭston, kreis en Israelo setlejon kaj nomis ĝin *Kiriat Bjalistok*.

Vespera arta programo

Filmo *La kazo de Kristo* (*Sprawa Chrystusa, The Case for Christ*) – usona dramfilmo el la kristana ĝenro. En la jaro 2017, surbaze de vera historio kaj la libro de Lee Strobel el la jaro 1998 kun la sama titolo, oni kreis ege interesan filmon. Ĝia heroo estas ateista ĵurnalisto, kiu deziras renversi kristanan kredon de sia edzino.

7.08.2023, lundo

Tykocin

Tykocin estas unu el la plej malnovaj urboj de nia regiono, Podlaĥio. Ĝi situas ĉe la rivero Narew. Tio gravas, ĉar la rivero Narew estis jam delonge la akva vojo por atingi Gdanskon. Tykocin ricevis la urbajn rajtojn en la jaro 1425. Ĝi elstaras pro la unika arkitekturo kaj tre riĉa historio.

La granda princo Vytautas donacis Tykocin pro meritoj al la litova familio Goštautas. En la manoj de tiu familio Tykocin restis dum pli ol 100 jaroj. Oni tie konstruigis la unuan lignan kastelon.

En la jaro 1522 Olbracht Gasztołd (Albertas Goštautas) invitis 10 judajn familiojn el Grodno al Tykocin por evoluigi komercon kaj metiarton.

La juda komunumo tre bone kaj rapide disvolviĝis. En 1860 loĝis en Tykocin 3545 judoj. En la jaro 1642 la lokaj judoj konstruis la Grandan Sinagagon.



En la jaro 1543, post la morto de Stanislovas Goštautas sen postulo, la urbon heredis la reĝo Sigismundo Aŭgusto la Dua, la filo de la reĝo Sigismundo la Maljuna. Sigismundo Aŭgusto konstruigis tie masonitan kastelon.

Dum la milito kontraŭ Svedio meze de la 17-a jarcento la kastelo estis severe damaĝita. En la jaro 1661 la reĝo Jan Kazimierz donacis la urbon kun vilaĝoj al la hetmano Stefan Czarniecki, kiu venkis super la sveda armeo. Aleksandra, la filino de la hetmano Czarniecki, edziniĝis al Jan Klemens Branicki. Lia pranepo, ankaŭ Jan Klemens Branicki, konstruigis en Tykocin en la jaro 1742 belegan, barokan preĝejon al la Sankta Triunuo kaj

fondis la monumenton al la hetmano Stefan Czarniecki.

En la jaro 1705 la reĝo Aŭgusto la Dua (Forta) inaŭguris en la kastelo de Tykocin la Ordenon de Blanka Aglo, per kiu li dekoris unue la rusan caron Petron la Unua dum kunveno en Tykocin, konfirmante la aliancon kontraŭ la sveda reĝo.

Dum la dua mondmilito, la 25-an kaj la 26-an de aŭgusto 1941 nazia taĉmento murdis en la arbaro Łopuchowo apud Tykocin 2500 judajn loĝantojn. La viktimoj estis entombigitaj en tri grandegaj teraj tomboj. Ĉiujare iliaj posteuloj alvenas al Tykocin por omaĝi la kruele mortigitajn praulojn. Post la iamaj loĝantoj konserviĝis la sinagogo, en kiu nuntempe funkcias muzeo.

En la 19-a jc., dum kelkaj jaroj, en Tykocin loĝis Fabian Fajvel Zamenhof, la avo de Ludoviko, interalie kun Marko, la patro de Ludoviko, kaj la familio. La kastelon nur en la 21-a jc. rekonstruis privata bjalistoka entreprenisto.

Vizito en la Eŭropa Cikonia Vilaĝo Pentowo

Pentowo estas mirinda loko por ŝatantoj de birdoj. Tiu ĉarma loko apud la urbo Tykocin ricevis la titolon Eŭropa Cikonia Vilaĝo. La germana fondaĵo Euronatur distingis la lokon en la jaro 2001 per tiu titolo, kiun kutime ricevas nur unu loko en la tuta lando. La loka historio de cikonioj komenciĝis en la jaro 1992 dum la uragano, kiu detruis multajn arbojn en la bieno. La detruitaj arboj iĝis idealaj lokoj por cikonioj, kiuj ĉiujare sur la arbopintoj kaj restantaj branĉoj konstruis novajn nestojn. Kiam ne plu restis liberaj lokoj, la cikonioj kreis nestojn sur domtegmento kaj elektrokonduktaj fosto. Nuntempe en Pentowo troviĝas 27 cikoniaj nestoj kaj la nombro de ili daŭre kreskas.



Prelegoj

1. Jan Maciejewski: *Historio de judoj el Tykocin*

Kuratoro de la Muzeo en Tykocin, historiisto, muzeologo, diplomistino de Katolika Lublina Universitato kaj de Jagelona Universitato.

En la intermilita periodo en Pollando loĝis pli ol 3 milionoj da judoj. Ĉiu deka civitano de nia lando apartenis al juda komunumo. Ekzistis pli ol 1200 judaj komunumoj kaj en ĉiu urbo estis kelkaj aŭ dekelkaj. La Holokaŭsto kaŭzis, ke ne nur la judaj komunumoj, sed ankaŭ judaj sinagogoj malaperis de la polaj urboj. Unu el malmultaj savitaj dum la milito estas la sinagogo en Tykocin, konstruita en la 17-a jarcento. Ĝi atestas pri

la religia vivo kaj la riĉa juda kulturo, kiuj disvolviĝis dum jarcentoj en la urbo Tykocin kaj pli vaste sur la pola teritorio.

Hodiaŭ en la sinagogo troviĝas Muzeo – filio de la Podlaĥia Muzeo en Bjalistoko. En la 1970-aj jaroj la domo estis detale renovigita por ripari la militajn spurojn. Sur la muroj oni refaris la murpentraĵojn. Surbaze de la malnovaj fotodokumentoj el la intermilita tempo (la aŭtoro – Szymon



Zajczyk) oni rekonstruis la historian aspekton de la sinagogo. I.a. oni rekonstruis la seĝon de Elija, kiu laŭ la mozaisma versio de la juda religio estis la rita simbolo de ligo inter Dio kaj la novnaskita kredanto.

Inter multaj rabenoj el Tykocin elstaris Abraham Kalmanowicz, kiu tie religie aktivis en la 1930-aj jaroj. Poste li iĝis la dekanato de la fama juda religia lernejo en Mirza (hodiaŭ Belorusio). Dum la soveta okupacio en la jaro 1940, helpe de polaj kaj japanaj diplomatoj, li aranĝis evakuadon de la lerneĵano al Japanio, kaj poste al Ŝanhajo. Danke al tio la infanoj feliĉe travivis la militon. En la jaro 1946 Kalmanowicz reaktivigis la lernejon el Mirza en Nov-Jorko. Hodiaŭ la fondita de li jeŝivo, funkcia en Brooklyn, apartenas al la plej prestiĝaj judaj religiaj lernejoj en la mondo.

2. Eljahu Josele

Judo, kiu antaŭ 30 jaroj elmigris el Bjalistoko al Usono. Li scipovas paroli Esperanton kaj prezentas en la pola lingvo sian videoblogon.

Kiel iĝi rabeno

Vi vere ne povas diri, kiu estas rabeno kaj kiu ne, ĉar rabeno ne havas apartajn vestaĵojn. Rabenoj ne vestiĝas malsame. Kion vi kutime vidas, kiel judoj (religiaj judoj) vestiĝas, kaj kutime ĥasidoj, tio ne estas aparta vestaĵo, ĝi estas nur ĉiutaga vestaĵo, kiun ni surhavas ĉiutage. Blanka ĉemizo, nigra pantalono. Iuj metos tiun pantalonon en ŝtrumpetojn, la aliaj surhavas



mallongan pantalonon kaj longajn ŝtrumpetojn. Ĉapelo kaj nigra mantelo ne estas speciala vestaĵo. Tio estas la ĉiutaga vestaĵo de ĉiu ĥasida judo. Tamen ekzistas unu kazo, kiam rabeno vestas sin iomete alimaniere ol la homoj ĉirkaŭ li. Tio estas la kazo de la sefardaj rabenoj, kaj ne de ĉiu rabeno, sed de la vere altrangaj rabenoj.

Rabeno enkondukas plenan apartigon inter religio kaj la ŝtato, kiun mi aldonos de mi mem: laŭ mi ĝi estas funkcio kaj titolo. Estas du ĉefrabenoj en Israelo. Unu reprezentas la sefardajn judojn, la alia – la aŝkenazajn judojn, kaj ekzistas unu ĉefrabeno en Pollando, kiu reprezentas la judojn de Pollando. Li estas la gvidanto de la judoj en Pollando. En Usono ne ekzistas la posteno de ĉefrabeno, ĉar la konstitucio de tiu ŝtato estas tre bona, tre sana kaj aliaj landoj devus sekvi la ekzemplon de Usono, ĉar religio devas ne miksiĝi kun politiko. Mi ne estas rabeno. Mi estas simpla sentitola judo, kiu parolas pri sia religio kaj provas fari tion en interesa kaj alloga maniero.

Kial judoj ne akceptas Jesuon kiel la Mesion?

Ĉi tiu prelego ne celas pruvi, ke estas io malbona ĉe kristanismo. Mi ankaŭ ŝatus peti, ke tiuj, kiuj trovas ĉi tie informojn, kiujn ili konsideras valoraj, ne uzu ilin por humiligi la aliajn aŭ ridindigi la kredojn de aliaj homoj. Mi petas, ke mia prelego kaj la informoj kiujn ĝi enhavas ne estu uzataj kiel argumentoj aŭ iloj por lukti kontraŭ kristanismo. Ĉio estas en ordo kun kristanismo. Kristanismo estas, kia ĝi devus esti. Kristanismo estas tio, kio ĝi volas esti. Memoru, ke mia versio de feliĉo ne estas nepre la versio de feliĉo de aliulo, kaj same kiel la versio de feliĉo de aliulo ne nepre estas mia versio de feliĉo. Ni ĉiuj rajtas je nia versio de feliĉo, je nia versio de religio, je niaj opinioj, kondiĉe, ke ili ne malutilas al aliaj homoj.

En la prelego mi provos montri la elementojn de kristanismo el la perspektivo de judismo. Bedaŭrinde, mi scias, ke multaj homoj ofendiĝos pro tio, kion ili aŭdas ĉi tie, kaj mi komprenas tion perfekte bone. Eble

ne indas aŭskulti ĉi tiun prelegon, ĉar ĝi povas enhavi frazojn, kiuj ne plaĉas al tiuj, kiuj senkritike kredas, ke Joŝke estis aŭ estas la Mesio. Joŝke signifas Jesuon. Tiel ni nomas tiun homon, ĉu al iu tio plaĉas aŭ ne. Pardonu min, se mi iel ofendas vin, sed ne estas kompromisoj en religio. Serĉi belajn vortojn aŭ rakontojn „ĉirkaŭ” estas, laŭ mi, malvera, malprudenta kaj tre maljusta al la alia persono. Politika ĝusteco ne havas lokon en la serĉado de la vero. Mi rimarkis, ke ofte en iuj interreligiaj konversacioj homoj ŝajnigas iaspecan partizanon kaj rakontas por ne ofendi la alian homon, kaj profunde ili scias, kion diras ilia religio pri tio aŭ alio.

Vespera arta programo

Filmo *Ida* (Oscar-premio + 7 aliaj premioj) – dramfilmo el 2013, kies intrigo okazas en Pollando en la jaro 1962. Oni montras la sorton de postulantino en katolika ordeno, kiu de sia onklino Wanda eksciis pri sia juddeveno. Kaj pri sia vera antaŭnomo *Ida*. La virinoj komencas komunan vojaĝon, kiu malkovras al ili sombran sekreton pri ilia vivo.

8.08.2023, mardo

Wasilków

Wasilków – unu el la plej malnovaj loĝlokoj en Podlaĥio. La unuaj historiaj fontoj mencias pri ĝi en 1358, sed oni scias, ke homoj vivis tie multe pli frue,

jam en la bronzepoko, kion pravas arkeologiaj elfosaĵoj. Oficale ĝi farigis urbo en 1566, dank’ al dekreto de la reĝo Sigismundo Aŭgusto. Ĝi estas loko ĉarma kaj komforta por loĝado, situanta ĉe la rivero Supraśl, ĉirkaŭita de la Knyszyn-Arbarego, kion pravas la rapide kreskanta loĝantaro. La tereno de la Komunumo



Wasilków troviĝas norde de Bjalistoko. En la urbocentro funkcias la Urba Publika Biblioteko – unu el la plej modernaj en Podlaĥio.

En 1719 la unita ĉefepiskopo Kiszka konsekris kapelon apud la fonteto en la Sankta Akvo. Tio estas la unua historia informo pri la loko.

Prelegoj en la seminariejo

1. Jarosław Parzyszek: *Hilelismo kaj homaranismo de Zamenhof*

Bjalistokano, finstudinto de la jura fakultato en Universitato Nikolao Kopernik en Toruń. Dum preskaŭ 30 jaroj E-aktivulo, i.a. en PSEK, UEA, TEJO, ILEI kaj BES.

Zamenhof dum sia tuta vivo klopodis solvi „la judan demandon”.

Zorgante pri tiu problemo li decidis anonime, uzante la pseŭdonimon „Homo sum”, ruslingve aperigi en 1901 la broŝuron *Gilelizm – reŝenje evrejskogo voprosa* (*Hilelismo – propono pri solvo de la hebrea demando*). Hilelismo, la titolo tute nekomprenebla por nehebreatoj, estas doktrino inspirita de la fama inter hebreatoj farisea rabeno Hilelo, samtempulo de Jesuo Kristo. La ĉefa, „ora regulo” de Hillel estis: „faru al la aliaj tion, kion vi deziras, ke ili faru al vi”. Laŭ li la plej grava afero estas la homamo. Kelkaj historiistoj supozas, ke Hillel estis intruisto de la juna Jesuo Kristo.

Evitante negativajn reagojn de esperantistoj nur en la jaro 1906 LLZ aperigis, en la *Ruslanda Esperantisto* en la lingvoj: rusa kaj Esperanto, la artikolon kaj aparte eldonitan broŝuron *Dogmoj de Hilelismo* kaj post kelkaj monatoj en Esperanto la libron *Homaranismo* (kun la enkrampa subtitolo *Hilelismo*). La titolo *Homaranismo* montras, ke post kelkjara hezitado la ĉefa celgrupo de la Zamenhofa idealismo fariĝis la esperantistoj, ne nur hebreatoj.

En la jaroj 1915/16, dum la unua mondmilito, li verkis tre gravan artikolon *Post la Granda Milito (Letero al Diplomatoj)*, kiu aperis en *The British Esperantist* kaj en la revuo de UEA – *Esperanto*. Li alvokis al la paca kunvivado de samrajtaj gentoj kaj al rezigno pri naciismoj. Li ankaŭ alvokis



al la unuigado de Eŭropo. Zamenhof laboris pri la ideoj de homaranismo preskaŭ ĝis sia lasta vivotago. Li esperis okazigi grandan homaranistan kongreson.

Zamenhof forpasis ne atinginte siajn grandajn celojn. Bedaŭrinde la homamo kaj tolerado de aliaj religioj, tradicioj kaj lingvoj ekregis nek post la unua, nek post la dua mondmilito.

2. Bengt Olof Åradsson: *La sveda sanktulino Elisabeth*

Sveda esperantisto, KELI-estrarano kaj redaktoro de la gazeto „Dia Regno”.

Maria Elisabeth Hesselblad (1870–1957) estis sveda katolika birgitina monaĥino. Ŝi estas honorita kiel sanktulo en la Romkatolika Eklezio.



Infanaĝe Hesselblad estis baptita kiel luterano en la Sveda Eklezio. Ŝi elmigris en la aĝo de 18 jaroj al Usono, kie ŝi trejni kaj laboris kiel flegistino por finance subteni sian familion en Svedio. Ŝi tiam komencis studi por iĝi kuracisto. Sed jam ekde la aĝo de 12 jaroj ŝi suferis de sangantaj stomakaj ulceroj. Tuj antaŭ diplomiĝo ŝi malsaniĝis grave, kaj estis dirite al ŝi, ke ŝi suferas de nekuracebla malsano. Ŝi tial finis sian medicinan studadon kaj ne diplomiĝis. Hesselblad tiutempe, ekde 1902, estis akceptita kiel membro en la Rom-

katolika Eklezio. Kiam la medicina profesio ne estis plenumita, ŝi iris al Romo, kredante ke ŝi tie baldaŭ mortos.

Dum la vizito al Romo ŝi ricevis religian alvokiĝon revenigi la Ordenon de Sankta Birgitta al Piazza Farnese, la origina domo de tiu ordeno. Sed en la tempo de Hesselblad la domo estis administrata de la Karmelita Ordeno. Dum la jaroj 1908–11 ŝi restis en la birgitinaj monaĥejoj diversloke. En 1911 ŝi fondis malgrandan komunumon ĉe Piazza Farnese en Romo. Tiu tiel nomata sveda branĉo de la Birgitina Ordeno hodiaŭ havas pli ol kvindek monaĥejojn en diversaj landoj, inkluzive la unuan monaĥejon en Kubo, kie laŭdire okazis miraklo.

Elisabeth Hesselblad laboris dum la dua mondmilito en Romo por protekti persekutatajn judojn. Meze de la germana okupado de Romo, ŝi kaŝis plurajn judojn en la monaĥejo en Piazza Farnese kaj aranĝis tie provizoran sinagogon. Pro tio en 2004 Hesselblad estis postmorte premiita per la premio „Justa inter la Nacioj” fare de la israela ŝtato.

Ŝi mortis en 1957 en Romo, kie ŝi ankaŭ ricevis sian finan ripozlokon. Jam en 1987 Johano Paŭlo la Dua komencis la kanonigon de ŝi, kio okazis en junio 2016.

3. Janusz Robioneck: *Religia vivo en la Eklezio sur la ekzemplo de la Instituto de Fratoj de Kristanaj Lernejoj*

La aŭtoro loĝas en Gdansko, kie li direktoras en la bazlernejo de Sankta Jean-Baptiste de la Salle. Dum 40 jaroj li estas religiema frato ĉe la Instituto de Fratoj de Kristanaj Lernejoj en Pollando. La Instituto estis fondita en Francio de Sankta Jean-Baptiste de la Salle.

En kristanaj religioj (katolikaj, ortodoksaj) videblas, ke ekzistas vivstilo dediĉita en speciala maniero al Dio. Ĝi estas nomita la religia vivo (ordo). Kio estas ordo en la Katolika Eklezio? Ordoj estas ordinarlingve nomitaj religiaj institucioj de komunuma karaktero, kies membroj strebas al sankteco plenumante tri promesojn: ĉasteco, malriĉeco kaj obeemo. Ili dediĉas sin al Dio per amo al Dio. Ili dediĉas sin al Lia servo, al la servo de siaj najbaroj kaj la tuta universala Eklezio. En la Eklezio ĉi tiu vivstilo estas gvidata de laikoj, t.e. tiuj, kiuj ne estas preskribitaj pastroj. Kompreneble, ni renkontas religiajn ordenojn kiuj havas monaĥojn (ne pastrojn) kaj pastrojn (ordinitaj homoj). Kelkaj ordenoj aŭ religiemaj paroĥanaroj aldonas kromajn religiajn promesojn, kiuj karakterizas la specifecon aŭ karismon de la ordo aŭ paroĥanaro. Ĉiu ordo de la religia instituto havas sian propran karakterizan robon, kiun surhavas ĝiaj membroj. Parolante pri la religia vivo,



menciindas la Dua Vatikana Koncilio. Kial? Ĝi estis la unua koncilio, kiu provis klarigi kio estas religia vivo. En la dokumento *Lumen Gentium* VI, en la ĉapitro pri religia vivo, oni asertas, ke religiuloj apartenas al la mistero de la Eklezio kaj ĝia misio en la mondo. La Koncilio montras al ni, ke tio estas donaco de Dio en la Eklezio kaj por la Eklezio. Ĝia misio estas reprezenti Kriston surtere.

4. Gregorio Jekel: Tradukproblemoj de Esperanto – la Hebrea Biblio

Magistro pri matematiko, instruisto, atestita projektestro, hiperpoligloto – membro de HYPIA atestita en Esperanto C1, la angla C1, la germana C2, la franca B2, la hispana B2, la rusa B2, la biblia hebrea, la biblia aramea kaj la pola (denaska). Individua membro de UEA. Aŭtoro kaj gvidanto de pluraj kursoj en Esperanto.



La prelego baziĝas sur mia lasta eldono de kurso (<https://eventaservo.org/e/7e1dez>). La ĉefa celo de ĝi estas interesi partoprenantoj pri la legado de hebrea Biblio en Esperanto kaj helpi kompreni kiel malfacilan taskon faris L.L. Zamenhof tradukante hebrean Biblion.

1. Kio estas la hebrea Biblio?
2. Kiom de lingvoj estas en la hebrea Biblio?
3. Bibliaj dokumentoj (manuskriptoj, kodeksoj, tradukoj) ekzistantaj en epoko de L.L. Zamenhof
4. Religia vivo de L.L. Zamenhof, homaranismo
5. KELI helpas – La plej malfacila traduko en Esperanto
6. Tradukteorio – bazo
7. 70 Hebreaj Vortoj Kiujn Ĉiu Kristano Devas Koni – Bibliografio.

5. Ágnes Ráczkevy-Eötvös: *La Biblia Rondo*

Ŝi estas hungara esperantistino. Ŝi naskiĝis kaj kreskis en hungara kristana familio, kie ŝi lernis de la avo, la konata reformita pastoro (József Farkas) malfermitan kaj ekumenan, eĉ inter-religian pensmanieron.

Mi kore invitas vin al bonetosa kunestado!
Ni legos citaĵojn el Biblio kaj pensados pri ili.

Ni libere rakontos, kion signifas tiu verso al ni persone. Ni demandos, se ni ne komprenas ion kaj ni provos kune eltrovi, kio estas la mesaĝo de la citaĵoj al nia hodiaŭa vivo.



Prelegoj en Wasilków

1. Grażyna Barszczewska-Banel: *Sankta Akvo*

Ŝi estas esperantistino de 50 jaroj, instruistino de matematiko kaj Esperanto.

Święta Woda (Sankta Akvo) – sanktejo, kiu troviĝas dek kilometrojn de Bjalistoko. Ekzistas multaj legendoj pri tiu loko kun fonteto. La unua dokumentita informo devenas de la jaro 1719. Tiam Bazyl Lenczewski (laboristo aŭ proprietulo de la paperproduktejo en Supraśl) post du jaroj rericevis tie la vidpovon. Kiel dankesprimon, super la mirakla fonteto li fondis kapeleton kaj en ĝi lokis bildon de la Dipatrino Doloranta.

En 1785 dum granda tempesto la kapelo estis detruita. Savigis nur la muro kun la mirakla bildo. Tiu fakto plifortigis la kredon de la loka loĝantaro kaj la fidon al la Dipatrino.

En 1839 la unitan kapelon la cara ŝtato transdonis al la ortodoksa eklezio. La kulto al la Dipatrino Doloranta estis ĉesigita, tamen lokaj



ortodoksaj pastroj nek kaŝis, nek neniigis la miraklan bildon. En la jaro 1921 la pola ŝtato oficiale redonis la kapelon al la katolika eklezio. La 26-an de decembro 1921 oni restarigis la nomon: Sanktejo de la Dipatrino Doloranta. Bedaŭrinde sur sian lokon ne revenis la mirakla bildo. Dum la unua mondmilito ortodoksa pastro forportis ĝin en Rusion. En la kapelo oni instalas ĝian kopion.

Malbona sorto trafis la lokon dum la dua mondmilito. Post ĝi la lokon prizorgis pastro Waław Rabczyński. Li faris multon. Grandan parton de tio ni povas vidi hodiaŭ.

De la jaro 1997 funkcias tie paroĥo. La paroĥestro de la komenco estas pastro Alfred Butwiłowski, kiu daŭre energie zorgas pri la sanktejo. Ankaŭ en la jaro 1997 estis inaŭgurita monto de krucoj.

2. Anna Mocarska: *Montoj de krucoj*

Ŝi estas esperantistino loĝanta en Wasilków apud Bjalistoko, aganta en Fondumo Zamenhof.

La tradicio starigi krucojn sur montoj estas precipe eŭropa kaj pli proksime tradicio pol-litova. En Pollando du tiaj lokoj troviĝas en Podlaĥio. La unua loko estas la Sankta Akvo en la urbo Wasilków, kaj la dua estas la Sankta Monto en Grabarka, kiu situas apud la vilaĝo Grabarka. La tria fama loko estas la Monto de Krucoj en Litovio, 200 kilometrojn for de Vilno. La Sankta Akvo kaj la Monto de Krucoj en Litovio estas katolikaj kaj la Sankta Monto Grabarka estas ortodoksa. Grabarka estas nomata ankaŭ la Monto de Pentofarantoj kaj tio estas la plej grava ortodoksa sanktejo en Pollando. Tiu loko estas antaŭ ĉio plena de bona energio, konsiderata unu el la lokoj de granda potenco. De pli ol 300 jaroj ĝi allogas ortodoksajn pilgrimantojn el diversaj partoj de Pollando kaj Eŭropo. Sur la supro de la monto estas malgranda, modesta, ortodoksa preĝejo. Preskaŭ ĉie ĉirkaŭ la preĝejo staras mirinda arbaro de krucoj alportataj dum



jardekoj de la pilgrimoj. Kvankam oni povas viziti tiun lokon dum la tuta jaro, la plej granda nombro de homoj alvenas en aŭgusto por la festo de la Transfiguriĝo de Kristo. Grabarka famiĝis en 1710 dum epidemio de ĥolero, kiu senkomplete frapis la regionon kaj kie post tio okazis mirakla resaniĝo de malsanuloj, kiuj fuĝis de la pesto kaj trinkis akvon el la apudmonta fonto. Por danki al Dio ili konstruis malgrandan kapeleton sur la supro de la monteto kaj la fonto kaj ĝia resaniga potenco komencis allogi ĉiam pli kaj pli multajn pilgrimojn kunportantajn krucojn. Poste sur la loko de la kapeleto oni konstruis lignan malgrandan ortodoksan preĝejon.

Sur Monto de Krucoj en Litovio la unua kruco aperis en 1430, kaj sekvantaj nur post 400 jaroj, post la novembro kaj la januara ribeloj. La plej doloriga epoko por tiu sanktejo estis la jaroj de la soveta okupado. La ateisma politiko de Sovetunio celis elimini tiun lokon per ĉiuj rimedoj. Oni multfoje dum la jaroj detruigis multajn krucojn. Tamen homoj senĉese alvenadis alportante krucojn kiel la simbolon de sia kredo.

3. Nina Pietuchowska: *Malnovritanoj en Pollando*

Esperantistino ekde la jaro 1988, laŭ profesio instruistino de fiziko kaj kemio. Nun mi estas pensiulino, kiu daŭre instruas Esperanton. Mi ŝatas naturon, vojaĝojn, fotadon kaj diversajn manlaborojn.

Inter kristanoj en Pollando estas grupeto de malnovritanoj. De kie ili aperis en nia lando? Oni devas reveni al la 17-a jc, kiam en Rusio la patriarko Nikon (1605–1681) kune kun la caro Aleksij Romanov (1629–1676) en la jaro 1654 komencis reformi la rusan ortodoksan eklezion. Laŭ la patriarko en la tiama eklezio estis tro multaj fremdaj elementoj. La altarlibroj diferencis de la antikvaj konstantinopolaj originaloj, sur ikonoj oni povis trovi influon de okcidenta baroko. Kunvokita sinodo de la eklezio en la jaro 1654 reekzamenis la librojn, korektis ilin kaj la sekva sinodo en 1655 akceptis la ŝanĝojn. Tuj, en la sama jaro, estis



eldonitaj korektitaj altarlibroj. Ne nur la libroj estis ŝanĝitaj, estis profanitaj, forbruligitaj multaj ikonoj skribitaj okcidente (en Pollando), kaj enkondukitaj estis multaj ŝanĝoj en la religia rito. La sinodo en 1656 konfirmis ĉiujn ŝanĝojn, sed multaj kredantoj kaj ĉefe malaltrangaj pastroj ne akceptis ilin. Pro tio ĉi komenciĝis severaj persekutoj de ili. Oni mortigis pastrojn, episkopojn, kiuj ne akceptis la reformon de Nikon. Por eviti la persekutadon la paroĥanoj kun la pastroj formigris al foraj lokoj (Siberio, okcidento, kaj nordo en Rusio). Daŭra persekutado devigis ilin multfoje ŝanĝi la loĝlokon. En la 18-a jc. la malnovritanoj komencis loĝi sur la orientaj terenoj de Pollando (Respubliko de Ambaŭ Nacioj). La posedantoj de tiuj terenoj volonte akceptis ilin, ĉar ili preferis loĝi en foraj, ne civilizitaj lokoj, kiujn ili komencis civilizati. Sed eĉ en Pollando ili ne estis tute sekuraj. La ĉelimajn terenojn multfoje invadis la rusa armeo, kiu kaptis milojn da malnovritanoj kaj sendis al Siberio. En la 18-a kaj la 19-a jc. la malnovritanoj ekloĝis sur la terenoj ĉirkaŭ Suwałki, Sejny, Augustów kaj en Mazurio. Tie ili povis vivi trankvile, kultivi sian kredon, tradician vivon, kutimojn. Kompreneble estis diversaj malfacilaĵoj, sed kompare kun la persekutado en Rusio, ili estis tolerataj. Dum la unua kaj la dua mondmilitoj multaj malnovritanoj estis devigitaj forveturi al Rusio kaj post la fino de ambaŭ militoj multaj ne sukcesis reveni.

9.08.2023, merkredo

Kruszyniany

Historio de tataroj en Podlaĥio

En Granda Litova Duklando tatara setligado komenciĝis fine de la 14-a jc. La granda duko Vytautas volonte akceptis en sia lando tatarojn, kiuj fuĝis de la granda imperio de Ĝingis-Hano, kiu estis nomata Ora Hordo. La setligado koncentriĝis ĉe la gravaj kasteloj: Troki, Wilno, Grodno, Mińsk, Nowogródek.

La duko alte taksis iliajn scipovon, kuraĝon, batalemon, lertecon kaj fidelecon. Ilia ĉefa tasko estis militservo. Ili servis kiel kurieroj, transportis

diversajn leterojn, protektis gravajn komercovojojn. Ili povas libere kredkonfesi islamon.

En la jaro 1385 Polujo kaj Granda Litova Duklando kreis personan union per la geedziĝo de la pola reĝino Jadwiga kun la litova duko Jogaila. En la jaro 1410 dum la fama batalo ĉe Grunwald kontraŭ la teŭtonoj la unuan fojon tataraj taĉmentoj batalis kune kun la pola armeo. Poste, en la pola armeo, estis tataraj eskadronoj, kiujn komandis tataraj koloneloj.

En la jaro 1679 la pola reĝo Johano la Tria Sobieski ne havis monon por pagi al la tataraj soldatoj. Pro militoj la pola fisko estis malplena kaj la pola reĝo donacis por la tataroj teron en Podlaĥio. Interalie ili ekloĝis en Kruszyniany, Bohoniki, Malawicze, Ciumicze, Drahle, Kamionka, Łużany, Nietupa kaj Żylicze. Ili havis la samajn rajtojn kiel la pola nobelaro kaj devis militservi. Tataraj nobeluloj rajtis edziĝi kun polaj, kristanaj nobelulinoj.

Tataroj ĉiam estis fidelaj al la Pola Respubliko – al la Unua kaj la Dua. Dum la septembra kampanjo en la jaro 1939 tataraj taĉmentoj batalis kontraŭ la germana armeo. Malgraŭ provoj de la cara registraro forigi la islaman religion, sub la rusa juĝo podlaĥiaj tataroj ne perdis ĝin, ne perdis ankaŭ sian kulturon. Ili perdis nur sian lingvon, ili parolas pole.

Post la dua mondmilito kaj ŝanĝo de la landlimoj multaj tataroj de la terenoj de iama Granda Litova Duklando ekloĝis en Pollando – interalie en Gdansko, Bjalistoko, Vroclavo, Gorzów Wielkopolski.

Nun en Podlaĥia Provinco la tataroj loĝas en Bjalistoko, Suchowola, Sokółka, Bohoniki kaj Kruszyniany. En ambaŭ lastaj vilaĝoj troviĝas antikvaj moskeoj, funkciaj tombejoj. La lokaj moskeoj ne similas al la arabaj moskeoj. Konstruis ilin lokaj majstroj, kiuj neniam vidis moskeon. Nur lunarkoj super kupoloj de la konstruaĵoj montras, ke ili estas moskeoj.



Moskeo en Kruszyniany estis konstruita en la 2-a duono de la 18-a jc. kaj en Bohoniki en la 19-a jc. Sur la tomboŝtonoj kaj monumentoj oni povas trovi epitafojn arabe, pole, ruse (sub la rusa juĝo en la 19-a jc. oni malpermesis uzi la polan lingvon).

Nuntempe en ambaŭ vilaĝoj ne estas multaj loĝantoj. Nur dum gravaj islamaj festoj venas multaj tataroj, kiuj loĝas en la tuta Polujo, por komune preĝi kaj festi.

Prelegoj

1. Janusz Aleksandrowicz: *Kion oni devas scii pri la islama religio?*

51-jara, edzino kaj 3 infanoj, Li studis en Sarajevo kaj en Eŭropa Instituto de Humanismaj Sciencoj en Châteaueu-Chinon, Francujo. De la jaro 2006 li estas imamo en la moskeo Kruszyniany, Pollando.



La pilieroj de islamo estas: Ŝahado (konfeso de la islama kredo), Salat (preĝo 5-foje tage, vendrede komune en moskeo), Saum (fastado dum ramadano de sunleviĝo ĝis sunsubiro), Zakato (almozdono), Haĝo (pilgrimado al Mekka almenaŭ unufoje en la vivo kongrue kun fizikaj kaj materialaj rimedoj). La pilieroj de la kredo:

- kredo je unu sola Dio (Ne estas alia diaĵo krom Alaho kaj Mohamedo estas Lia sendito),
- kredo je anĝeloj,
- kredo je libroj,
- kredo je la Tago de la Lasta Juĝo,
- kredo je destino.

La bazo de la islama kredo estas la sankta libro Korano, kiu konsistas el 114 ĉapitroj (nomataj suraoj). Ĝi estis rivelita al Mohamedo pere de la ĉefanĝelo Gabriel.

Heroldu! Nome de via Sinjoro, kiu kreis!

Kiu kreis homon de grumelo de koaguliĝita sango!

Heroldu! Via Sinjoro estas plej nobla!

Tiu, kiu instruis homon tion, kion li ne sciis.

La profeto Muhammed Ibn Abd Allah (en Eŭropo nomata Mohamedo) naskiĝis en la jaro 572 en la tribo de Kurajŝoj. La patro de Mohamedo mortis antaŭ lia naskiĝo kaj lia patrino mortis kiam li estis 6-jara. Poste pri li okupiĝis komence lia avo Abd al-Muttalib kaj post 2 jaroj lia onklo Abu Talib. Kiel plenkreskulo Mohamedo okupiĝis pri komerco ĉe Ĥadiĝa, virino, kiu estis pli 15 jarojn pli aĝa ol li. Poste li edziĝis kun ŝi. Kvardekjaraĝa Mohamedo havis la unuan revelacion en la groto Hira en Mekko transdonitan de la ĉefanĝelo Gabriel. Dum la sekvaj 23 jaroj ĝis lia neatendita morto li ricevis sekvajn revelaciojn. La Koranon kompletigas tradicio (suna) de la profeto Mohamedo, kiu enhavas liajn diraĵojn kaj raportojn pri lia agmaniero, nomatajn haditoj.

La Koranon oni devas deklami nur arabe.

2. Viviana Isernia: Kontrasto de stereotipoj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Islamo kaj aliaj religioj

Vicprezidentino de Amnesty International – Italio, tradukistino kaj instruistino de la araba lingvo.

Islamanoj, ne Mahometanoj; eldiri „Allah Akbar” (Dio estas Granda) ne estas islama terorismo.

Estas multaj antaŭjuĝoj kontraŭ islamismo, sed eblas kontraŭstari ilin per scio. Ĉiu havas la rajton je libereco de penso, konscienco kaj religio; ĉi tiu rajto inkluzivas liberon ŝanĝi sian religion aŭ kredon kaj manifesti, sole aŭ en komunumo, publike kaj private, sian religion aŭ kredojn, en instruado, en praktikoj, en kultado kaj en la observado de ritoj, legeblas en la Artikolo 18 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Tamen ekde antikvaj tempoj, individuoj aŭ grupoj de homoj, suferas ĉie diskriminacion pro sia religio. La ekzemplo: homoj kiuj konfesas Islamon.



Religia maltoleremo povas havi diversajn nuancojn kaj povas okazi ankaŭ inter tiuj, kiuj konfesas la saman religion: ni vidos la kazon de Saŭd-Arabio.

Per mallonga partoprena laborrenkontiĝo, la konceptoj de stereotipoj, antaŭjuĝoj kaj diskriminacio kontraŭ islamanoj estos prezentitaj.

Kion ni scias aŭ pensas, ke ni scias pri homoj de islama religio? Kion la stereotipoj, kiuj trafenetras nian kulturon proponas al ni, kiel la dominantan ideon de Islamo? Aŭ denove, kiel stereotipoj transformiĝas en diskriminaciajn sintenojn kaj agojn interrete, en lernejoj aŭ en publikaj lokoj?

Islamismo estas monoteisma religio, kiu ampleksas almenaŭ 49 landojn en la mondo, sed ĝi estas ankaŭ religio kun mil vizaĝoj kaj necesas havi kompletan bildon de la grandega islama komunumo por ne renkonti terminologiajn kaj konceptajn erarojn kaj, sekve, ne partopreni en diskriminaciaj agoj kontraŭ viroj kaj virinoj, kiuj simple kredas je doktrino malsama ol la nia.

Krei spacojn por dialogo pri la fenomeno de religia maltoleremo estas konstruado de kulturo bazita sur homaj rajtoj kaj respekto.

Vespera arta programo

La Tatarata Infan-Junulara Ensemblo Buńczuk (Bunĉuko) estis fondita de Halina Szahidewicz en la jaro 1999. Ĝi funkcias ĉe la Islama Konfesia Komunumo en Bjalistoko. De la jaro 2012 zorgas pri ĝi Anna Mucharska.

Infanoj kaj gejunuloj dancas tatarajn dancojn, ankaŭ kantas kaj deklamas poemojn. La ensemblo estas invitata al lernejoj kaj diversaj kulturaj institucioj por multkulturaj renkontiĝoj. La ensemblo donas la eblon pasigi kune tempon por infanoj kaj junularo, permesas konatiĝi kun sekretoj de la tatarata kulturo, permesas plifortigi la senton de etna identeco. Ĝi integras la ensemblanojn. De la komenco en la ensemblo aktoris proksimume 70 personoj. Krom la plifortigado de la etna grupo, kiun kreas polaj tataroj, en la ensemblo formiĝas la sintenoj: socia kaj patriotisma.

La ensamble disvastigas la kulturon de familia kaj ĉiutaga vivo, instruas toleremon al malsameco. En la programo de la ensamble estas dancoj kaj kantoj de krimeaj tataroj, ankaŭ la grupa danco – Horan. Iliaj kantoj montras belecon de Krimeo pere de sopiro pri la amata lando.



10.08.2023, ĵaŭdo
Bjalistoko

Prelegoj

1. Jarosław Parzyszek: *Protestantoj kaj la historio de la preĝejo al Sankta Adalberto en Bjalistoko*


La urbo Bjalistoko oficiale estis fondita en 1749, sed jam pli frue ĝi estis privata posedaĵo de la familio Wiesiołowski. Post la forpaso de Piotr Wiesiołowski la Maljuna dum kelka tempo la kastelon kaj la familiajn posedaĵojn administris Ostafi Wołłowicz – la onklo de Piotr Wiesiołowski la Juna. Tiu onklo kaj junaĝe ankaŭ lia nevo estis evangelianoj. Proksimume en la jaro 1570 Piotr Wiesiołowski konvertiĝis al katolikismo. Poste li konstruigis la blankan preĝejon. Tamen en la najbara urbo Zabłudów posedata de la evangeliana familio Radziwiłł en 1608 estis fondita evangeliana paroĥo, kiu aktive funkciis dum du jarcentoj. En Bjalistoko pli multaj evangelianoj aperadis dum la epoko de Jan Klemens Branicki, kiu post la jaro 1728 venigadis en la urbon multajn artitektojn, pentristojn, metiistojn kaj muzikistojn el okcidenta Eŭropo, inter kiuj estis i.a. Johann Sigmund Dybel kaj Johann Heinrich Klemm. Post la tria dispartigo de Pollando en 1795 la reĝa Polujo malaperis el la mapo de Eŭropo kaj Bjalistoko fariĝis la ĉefurbo de la provinco Prusujo Novorienta. Jam

en la jaro 1796 fondita estis la aŭgsburg-evangelia komunumo, unue kiel filio de la komunumo de Zabłudów. Laŭ la iniciato de la direktoro de la Prusuja Novorienta Provinco August Karl von Holsche kaj lia edzino Eva, jam en la jaro 1796 okazadis la unuaj, evengalianaj diservoj, provizore en la teatrejo Komedialnia, kiu troviĝis apud la palaco de Branicki. Baldaŭ fonditaj estis ankaŭ lernejo kaj – jam en 1797 – tombejo, ĉe la nuna strato Młynowa. La unua pastro Brettschneider, kiu samtempe estis asistanto de *Neu-Ostpreussisches INTELLIGENZ-BLATT zur nützlichen Bequemlichkeit des Publici* – *Nowo-Wschodnich Pruss DONIESIENIA ku Wygodzie Publicznej* – dulingva revuo, eldonata dum la jaroj 1798–1806. Oficiale la 17-an de februaro 1803 la evengeliana paroĥo de Zabłudów estis migrigita al Bjalistoko. La unuaj kaj la plej aktivaj bjalistokaj fabrikistoj estis la germandevenaj evangelianoj Commichau, Moes, Zachert k.a., kiuj venis el Lodzo kaj el Zgierz. La evangelianoj fondis proprajn gazeton, paroĥon, hospitalon, lernejojn. Ili konstruigis fabrikojn por produktado, palacojn por loĝado, ankaŭ loĝdomojn por la laboristoj. Antaŭ la unua mondmilito riĉa, kelkmilpersona paroĥo gvidata de la paroĥestro Teodor Zirkwitz konstruigis en la urbocentro modernan preĝejon al Sankta Johano. Oni instruis kaj predikis tie ne nur en la germana, sed ankaŭ en la pola. Post la unua mondmilito la pastro Zirkwitz provis daŭrigi la tradicion de pollingvaj diservoj, lernejoj ktp. Li mortis en la jaro 1943. Ĉar post la dua mondmilito ĉio postevangeliana estis laŭ la novaj reguloj „postgermana”, oni forprenis la posedaĵojn de la evengeliana komunumo kun konstruaĵoj kaj tombejoj. Ruinigitaj estis i.a. la tombejoj ĉe la stratoj: Młynowa/Rynek Sienny, Świerkowa, Produkcyjna kaj grandparte Pułkowa. En la Preĝejo Sankta Johano novaj decidpovaj instancoj planis funkciigi kinejon, sed finfine la preĝejon transprenis en 1944 la katolikoj. La oficiala kontrakto pri la aĉeto de la preĝejo estis subskribita nur en la jaro 1973. Intertempe la preĝejo estis „rebaptita” – la nova, katolika patrono iĝis Sankta Adalberto kaj la interno estis tute rearanĝita. Nur en la jaro 2002 okazis aliloke restarigo de la evangelia paroĥo en Bjalistoko.

2. Jurek Jurczyński: *Malnovortodoksa lingvo en ortodoksa preĝejo ludas similan rolon kiel Esperanto inter esperantistoj tra la urbo*

Li naskiĝis en Gdańsk, studis ŝipkonstruadon ĉe Politekniko Gdansk kaj financojn ĉe Erasmus-Universitato Rotterdam. Li interesiĝas pri lingvoj, historio, naturo kaj pasie vojaĝas; ekskursgvidanto.

En la unua duono de la 9-a jarcento, la ĉefurbo de la Orientromia imperio gvidis kristanigimision inter la slavaj nacioj enloĝantaj Balkanion. Tiuj nacioj, relative lastatempe alvenintaj en sudorientan Eŭropon en la procezo de grandaj migradoj el la oriento, ankoraŭ ne havis sian propran skriban kulturon. La principoj de la nova kredo estis kolektitaj en tiu tempo en la libroj de la Malnova kaj Nova Testamentoj, haveblaj en la greka, la latina kaj la hebrea lingvoj.



Por transdoni tion al la slavaj popoloj estis necese komence krei alfabeton taŭgan por ilia lingvo. Du fratoj, Cirilo (826–869) kaj Metodio (815–885), entreprenis tiun taskon. Tamen la tasko disponigi la Sanktajn Skribojn al la slavoj montriĝis multe pli komplika. Evidentiĝis, ke ili ne posedas sisteman gramatikon, ke al ilia lingvo mankas multaj konceptoj el la kampoj de religio, filozofio kaj rilataj.

3. Oldřich Arnošt Fischer: *Adaptado de romaoj – dornoplana vojo*

Moravia esperantisto el Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (Ĉeĥa Respubliko), keliano, amatora natursciencisto (entomologo), fotisto.

En la jaro 1971 en Londono-Orpington okazis la 1-a Internacia Romaa Kongreso, kies partoprenantoj el 14 landoj decidis, ke ili ne plu volas esti nomataj „ciganoj”. Ili aprobis sian flagon kaj romaan himnon. En nuntempa Ĉeĥa Respubliko (ĈR) loĝas ĉirkaŭ 300.000 da romaoj, 80% el ili devenas el Slovakio, 10% el Rumanio, la aliaj estas bohemiaj romaoj kaj germanaj romaoj (sintoj). Socialisma reĝimo (1948–1989) kaŭzis disigon de romaaj familioj, neniigon de romaaj tradicioj, ĝi subpremis romaan



lingvon kaj nesenteme devigis romaojn de diversaj sociaj tavoloj loĝi kune. Romaoj malfacile serĉas laboron. Nur malmultaj romaaj infanoj akiras mezlernejan kaj universitan edukadon. Eĉ nevolontaj artefaritaj sterilizadoj de romanoj okazis. Plimulto da romaoj estas needukitaj kaj kelkaj suferas de lingva bariero. Muzeo de Romaa Kulturo en Brno helpas al interkompreno de romaoj kaj majoritata populacio de ĈR.

Vespera arta programo

Koncerto de la ensemblo Frey-Lech Band

La ensemblo Frey-Lech Band agas jam de 13 jaroj en la podlaĥia regiono. Per sia repertuaro ĝi revenas al la intermilita Bjalistoko, kie la juda muziko estis grava elemento de multkultura Pollando. La grupo (ne ĉiam samkonsista) prezentis sin sur diversaj scenejoj ornamante aranĝojn i.a. la Festivalon de la juda kulturo Zachor en Bjalistoko, en sinagogoj de Grodno, Vroclavo, Orla, Tykocin, dum la Nokto de Muzeoj en Bjalistoko ktp. Tradiciajn judajn kantojn en Esperanto ĝi prezentas ĉiujare dum la bjalistokaj Zamenhoftagoj. La ensemblo konsistas el: Katarzyna Breczko (kantado); Joanna Gryko (violono); Liliana Czyżewska (gitaro, kantado); Mateusz Januszczyk (trumpeto, kantado); Lech Mazurek (akordiono, kantado).



11.08.2023, vendredo

Supraśl

Mallonga historio de la urbo Supraśl

Supraśl situas 16 kilometrojn norde de Bjalistoko, en la arbarego de Kny-szyn, ĉe la rivero Supraśl. Iam etendiĝis tie grandaj praarbaroj.

En la 15-a jarcento parton de la arbaro ricevis de la pola reĝo Kazimierz Jagiellończyk la rusa nobela familio Chodkiewicz.

Aleksander Chodkiewicz, la marŝalo de la Litova Grandduklando, koloniigis la terenon kaj bonvenigis novloĝantojn.

En la jaro 1498 li invitis monaĥojn el kieva ortodoksa monaĥejo al sia setlejo Gródek, sed monaĥoj petis al Chodkiewicz ŝanĝi lokon, ĉar en Gródek estis tro multe da bruoj.

Laŭ la legendo, en la jaro 1500 monaĥoj pretigis lignan krucon, metis sur ĝi flamantan kandelon kaj ĵetis ĝin en la riveron Supraśl. La kruco flosis laŭlonge de la rivero kaj haltis apud iu monteto. Tie la monaĥoj ekkonstruis unuan lignan ortodoksan preĝejeton kaj ekloĝis ĉirkaŭe.

Inter la jaroj 1503 kaj 1511 la monaĥoj konstruis novan preĝejon. La ortodoksa preĝejo estas defenda konstruaĵo en gotika stilo, tre nekutima en tiu ĉi regiono. La kupolo estas en la bizanca stilo. Ĉirkaŭ la jaro 1557 la serba pentristo Nektarij kun siaj lernantoj venis por kovri la murojn de la preĝejo per admirindaj freskoj. Tio pruvas la kontaktojn de la monaĥejo kun la balkana regiono. La preĝejo ricevis la nomon de Anunciacio al la plej Sankta Virgulino Maria. Tian blazonon ricevis poste la urbo Supraśl.

Rapide ĉirkaŭ la monaĥejo kreskis la vilaĝo. La monaĥoj konstruis muelojn, bakejon, bierfarejon, artefaritajn lagetojn por fiŝoj, legoman ĝardenon.



En la fino de la 17-a jc. la monaĥoj konstruis grandan, 3-etaĝan Palacon de Arkimandrito kun bela fasado. (Arkimandrito estas titolo de la ortodoksa abato).

Poste ili kreis presejon, kie oni eldonadis librojn, ne nur ekleziajn. Oni uzadis la presliterojn latinajn kaj kirilajn. La papero estis produktata surloke.

Fine de la 19 –a jarcento oni starigis la duan preĝejon el ruĝaj brikoj, kies patrono estas Johano la Teologo.

Bedaŭrinde, fine de la dua mondmilito, en julio 1944, la fuĝanta, germana armeo eksplodigis la gotikan preĝejon. La ruinoj kaj fundamentoj estis prezervitaj.

En la fino de 20-a jc. monaĥoj jure rericevis sian monaĥejon kaj komencis rekonstruigi ĝian belegan preĝejon.

Multaj malnovaj preĝejoj freskoj estas hodiaŭ eksponataj en la loka Muzeo de Ikonoj.



Komenco de la teksa industrio

En la jaro 1795 okazis la 3-a dispartigo de Pollando kaj tuta podlaĥia regiono estis enigita la Rusan Imperion.

La malgranda vilaĝo ŝanĝiĝis kiam el la jaro 1834 alvenis al Supraśl la fabrikisto el Zgierz – Wilhelm Zachert. Li konstruigis tie la unuan teksan fabrikon por vendi malmultekoste al rusoj diversajn teksaĵojn. Poste alvenis

aliaj: Jansen, Buchholtz, kaj ankaŭ ili komencis konstrui teksajn fabrikojn. Multaj germanaj teknikistoj – luteranoj laboris en tiuj fabrikoj. La vilaĝo rapide disvolviĝis. Oni konstruis katolikan kaj evangelian preĝejojn. La fabrikistoj ordonis konstrui lignajn domojn por la laboristoj.

Fabrikisto Adolf Buchholtz konstruigis en la fino de la 19-a jarcento bel-egan palacon por sia familio. Nuntempe en la palaco situas Liceo de Belaj Artoj.

Prospero de teksaĵindustrio en Supraśl finĝis en la jaro 1944, ĉar for-iranta germana armeo detruis ĉiujn fabrikojn.

Post la dua mondmilito Supraśl servas kiel somera ripozejo. En la jaro 2001 Supraśl ricevis statuson de kuraĉloko, kiu allogas pli kaj pli novajn pacientojn.

Bjalistoka Kulturcentro – Centro Ludoviko Zamenhof (BK/CLZ)

Centro Ludoviko Zamenhof (CLZ) estas urba kultur-institucio, parto de la Bjalistoka Kulturcentro (BOK), establita en Bjalistoko, laŭ la propono de la urbestro de Fondumo Zamenhof kaj de Bjalistoka Esperanto-Societo, subtenita de la urbestro de Bjalistoko Tadeusz Truskolaski, okaze de la 94-a UK en la jaro 2009. La 21-an de julio 2009 okazis la oficiala malfermo de la Centro por la loĝ-antaro de Bjalistoko.

Al siaj vizitantoj la Centro proponas la konstantan ekspozicion *Bjalistoko de juna Zamenhof* kaj diversajn portempajn ekspoziciojn, koncertojn, filmoprezentojn, teatrajn spektaklojn. En ĝi estas regule organizataj diskutoj, prelegoj kaj literaturaj prezentaĵoj.

Centro Ludoviko Zamenhof organizas aron da edukaj kursoj por infanoj kaj adoleskantoj, enkondukas modernajn soci-edukajn projektojn kiel *Religioj de Podlaĥio* kaj *Ĉapelo el la Centro Zamenhof*.

En la sidejo de BOK/CLZ troviĝas ankaŭ la Filio n-ro 14 de la Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki – Esperanto-Libraro. Ĝi estas, kio maloftas en Pollando, publika biblioteko, kiu kolektas kaj pruntedonas Esperanto-eldonaĵojn. Ĝi disponigas ĉ. kvar mil librojn kaj ĉ. ducent novajn kaj



malnovajn gazetajn titolojn. La plimulto de la eldonaĵoj estas en Esperanto, iuj – du- aŭ tri-lingvaj. Oni abonas tie interalie la gazetojn *Pola Esperantisto* kaj *Esperanto*.

De 2016 en la kafejo Fama ĉe la strato Legionowa 5 oni realigas la projekton *Bjalistoka Lingva Kafejo*. Temas pri regulaj vesperaj renkontiĝoj dediĉitaj al ĉiuj, kiuj deziras ekzerci sin en lingvoj de la mondo, ekkoni novajn homojn kaj iliajn kulturojn. La projekto vivas danke al la kunlaboro de Bjalistoka Kulturcentro kaj Bjalistoka Esperanto-Societo, kiu estis ĝia iniciatinto.



Vespera arta programo

Halina Kuroptnicka-Salamon prezentas sian poezion. Ŝi estas blinda verkistino, loĝanta en Wrocław, instruistino, verkanta en la lingvoj pola kaj Esperanto.

Bjalistokaj ZEO-j

Zamenhof-Esperanto-Objektoj en la kongresurbo

N-ro – Situo – Objekto – Ekzistas de la jaro



1. Zamenhof-strato (11.07.1919/1949).
2. La kvartalo Bacieczki – Strato Antoni Grabowski (1996).
3. La kvartalo Bacieczki – Strato de Esperantistoj (1996).
4. Str. Waszyngtona 17 – la Porinfana Kliniko Ludoviko Zamenhof (1988).
5. En la Kliniko, str. Waszyngtona 17 – la Memorangulo – „Esperanto” en la hospotala konferenca salono (1988).
6. En la Kliniko, str. Waszyngtona 17 – la Ekzercsalono Lidia Zamenhof (1992).
7. Str. Piękna 3 – la Sidejo de Fondumo Zamenhof kaj Bjalistoka Esperanto-Societo (1992/1995/2000).
8. Str. Malmeda – monumento al L.L. Zamenhof (busto sur soklo, 1973, aŭtoro: Jan Kucz).
9. Lernejo ĉe la str. Warszawska 8 – memortabulo pri L.L. Zamenhof (1987).
10. La naskiĝdoma loko, str. Zamenhofa 6 – esperantlingva tabulo pri L.L. Zamenhof (6.08.1959).
11. La naskiĝdoma loko, str. Zamenhofa 6 – tabulo kun foto de la naskiĝdomo de LLZ (2008).
12. La naskiĝdoma loko, str. Zamenhofa 6 – murpentraĵo kun L.L. Zamenhof sur balkono kaj e-istoj Jakub Szapiro kaj Abraham Zbar (05.06.2008).
13. La kvartalo Bagnówka – strato Jakobo Ŝapiro (ul. Jakuba Szapiro, 2017–2018).

14. Str. Lipowa 33 – esperantingva omaĝtabulo al Jakub Szapiro (1991/2009).
15. Str. Malmeda 3 – la vendejo Esperantujo.
16. Str. Mazowiecka 48 – la kafejo Kafejeto (11.2014).
17. Str. J.K. Kluka 11A, la kvartalo Bagnówka – la bazlernejo n-ro 51 Ludoviko Zamenhof (15.12.2008).
18. Str. Piękna 3 – memorŝtono pri la planata Monda Esperanto-Centro (1987).
19. Str. Warszawska 19 – Centro Ludoviko Zamenhof (25.07.2009).
20. 15 trilingvaj informtabuloj en Esperanto, pola, angla kaj en brajla skribo: Turisma itinero *Esperanto kaj multaj kulturoj* (2009).
21. Str. Warszawska 19 – la biblioteko Esperanto-Libraro (12.05.2010).
22. Str. Legionowa 10 – la hotelo Esperanto (1.09.2012).
23. Str. Broniewskiego 23, la kvartalo Antoniuk – la esperantlingva murpentraĵo *Liberecon por la mondo* (5.10.2018).
24. Str. Zamenhofa 1 – monumento al juna L.L. Zamenhof (14.04.2019).
25. Str. Leśna 30 – murpentraĵo kun L.L. Zamenhof sur la bazlernejo n-ro 20 (20.10.2020).
26. Str. Zamenhofa – *Ursido*, bronza skulptaĵo de urso (01.2022).
27. Str. Szymon Datner, juddevena historiisto, bjaliŝtoka esperantisto) (27.02.2023).



Listo de la Kongresoj de KELI

#	jaro	urbo (* – ekumena)	lando
72	2023	Bjalistoko	Pollando
71	2022	Domaszék	Hungario
70	2021	Legnica *	Pollando
69	2019	Révfülp	Hungario
68	2018	Poděbrady *	Ĉeĥio
67	2017	Zöblitz	Germanio
66	2016	Bratislava	Slovakio
65	2015	Strasbourg *	Francio
64	2014	Trento *	Italio
63	2013	Svitavy	Ĉeĥio
62	2012	Zöblitz	Germanio
61	2011	Poděbrady	Ĉeĥio
60	2010	Beregdaróc	Hungario
59	2009	Wrocław *	Pollando
58	2008	Pribylina	Slovakio
57	2007	Pelplin *	Pollando
56	2006	Strazne	Ĉeĥio
55	2005	Piliscsaba *	Hungario
54	2004	Bystřice	Ĉeĥio
53	2003	Rimini *	Italio
52	2002	Berekfürdő	Hungario
51	2001	Zagreb *	Kroatio
50	2000	Janské Lázně	Ĉeĥio
49	1999	Gliwice *	Pollando
48	1998	Nantes *	Francio
47	1997	Graz / Zalaegerszeg *	Aŭstrio / Hungario
46	1996	Szombathely *	Hungario

45	1995	Kaunas *	Litovio
44	1994	Gostyń *	Pollando
43	1993	Viviers *	Francio
42	1992	Velence *	Hungario
41	1991	Jönköping	Svedio
40	1990	Le Louverain	Svislando
39	1989	Annan Court *	Britio
38	1988	Jyväskylä	Finnlando
37	1986	Rouillé	Francio
36	1985	Augsburg *	Germanio
35	1983	Esztergom-Kertváros	Hungario
34	1982	Burgh-Haamstede	Nederlando
33	1981	Dalfsen *	Nederlando
32	1980	Södertälje	Svedio
31	1979	Bienenberg	Svislando
30	1978	Varna *	Bulgario
29	1977	Edinburgh	Britio
28	1976	Montpellier	Francio
27	1975	Jönköping	Svedio
26	1974	Hamburg-Langenhorn *	Germanio
25	1972	La Rochette	Francio
24	1971	Abingdon	Britio
23	1970	Brno / Klagenfurt *	Ĉeĥoslovakio / Aŭstrio
22	1969	Kiljava	Finnlando
21	1968	Limburg / Lahn *	Germanio
20	1967	Torre Pellice	Italio
19	1966	Debrecen	Hungario
18	1965	Boldern	Svislando
17	1964	Lunten	Nederlando
16	1963	Graz	Aŭstrio
15	1962	Strandbaden	Svedio

14	1961	Bishop's Strotsford	Britio
13	1960	Hedenesse	Nederlando
12	1959	Nijenrode	Nederlando
11	1958	Würzburg	Germanio
10	1957	Münchenwiler	Svislando
9	1956	Jönköping	Svedio
8	1955	Reims	Francio
7	1954	Oosterbeek	Nederlando
6	1953	Rüdlingen	Svislando
5	1952	Fredtun	Norvegio
4	1951	Markleuthen	Germanio
3	1950	La Rochette	Francio
2	1949	Teylingerbosch	Nederlando
1	1948	Tostarp	Svedio

Listo de kongresanoj

#	nomo	lando	adreso	retadreso	telefonnumero
1	Philippe Cousson	Francio	86340 Nouaiville-Maupertuy 26 rue de Pré Ventenet	philippe.cousson@str.fr	+33 684 815 325
2	Ágnes Ráczkevy-Eötvös	Hungario	1072 Budapest, str. Klauzák 32	agnes@raczkevy-eotvos.com	+36 30 2000 306
3	Andre Åradszon	Svedio	28148 Hässleholm Kungsgatan 13 B lok. 1201	andre.aradsson@gmail.com	+46 738 863 574
4	Bengt Olof Åradszon	Svedio	28148 Hässleholm Kungsgatan 13 B lok. 1201	dr.boarad@yahoo.se	+46 702 004 574
5	Pavel Polnický	Ĉeĥio	29001 Poděbrady, Lidická 939/11	polnickypavel@seznam.cz	+420 723 672335
6	Stanisław Dobrowolski	Pollando		fry@o2.pl	+48. 606 742 033
7	Nina Pietuchowska	Pollando		ninjab@wp.pl	+48. 508 868 735
8	Jarostaw Parzyszek	Pollando		parzyszek@tlen.pl	
9	Elżbieta Karczewska	Pollando	15-269 Białystok, Waszyngtona 14B m 119	karczewskaela@gmail.com	+48. 791 856 034
10	Iza Walentynowicz	Pollando		walentynowicz.iza@gmail.com	+48. 602 407 533
11	Viviana Isernia	Italio		vivianatradingioniarabo@gmail.com	
12	Aleksander Zdechlik	Pollando	41-800 Zabrze, Wyzwolenia 4/8	aleksander.zdechlik@gmail.com	+48.664 171 168
13	Jerzy Jurczyński	Pollando		Jurek.jurczynski@hotmail.com	
14	Jadwiga Greger	Pollando		jadwigagreger@gmail.com	
15	Alicja Patrykus	Pollando		alicjapotrykus@tlen.pl	
16	Pavol Petrik	Slovakio		pavol1907@gmail.com	
17	Gregorio K. Jekel	Germanio	37 431 Bad Lauterberg, Am Paradies 79A	via konsultisto@yahoo.com	+49.15129405321
18	Kazimierz Noculak	Pollando	66-510 Bobrowka, Wesoła 1	kazimierz.noculak@wp.pl	+48.608 588 729
19	Antal Pesti	Hungario		antal.pesti@indamail.hu	
20	Mirostawa Kubicka	Pollando		kasada09@gmail.com	
21	Desiree Derksen	Belgio			
22	Gabriella Stier	Rumanio		stier.gabriella@gmail.com	
23	Oldřich Arnošt Fischer	Ĉeĥio		olda.morav@seznam.cz	
24	Roman Gmyrek	Pollando		ludovkoo@wp.pl	
25	Helena Biskup	Pollando	82-400 Sztum, Spokojna 5/4		+48.534197600
26	Krystyna Lesińska	Pollando			

27	Anna Mocarska	Pollando				
28	Marek Dąbrowski	Pollando			kulturyista.md@gmail.com	48. 606364843
29	Zdenka Peterková	Čeĥio				
30	Miroslav Peterka	Čeĥio				
31	Helena Klesová	Čeĥio	28912 Sadská, Jindřichova 500		sadskaek@seznam.cz	420.721015898
32	Vačlav Pospíšil	Čeĥio			vaclavpoospisil@senam.cz	
33	Helena Burchardt	Pollando				
34	Emile Malanda Niana	DR Kongo			emimaland@gmail.com	
35	Zofia Śmístek	Pollando			zosiasmistek@wp.pl	
36	Halina Salamon	Pollando			halina.salamon@wp.pl	
37	Elżbieta Czubaj	Pollando			eladrem@gmail.com	
38	Boris Artre Veranez	Kubo				
39	Irena Gowin-Różecka	Pollando			irarozecka@gmail.com	
40	Józef Poraj-Różecki	Pollando			irarozecka@gmail.com	
41	Filomena Di Re	Italia				
42	Raffaele Del Re	Italia			rdelre@iscali.it	
43	Ivanka Karasová	Čeĥio			karasovai@centrum.cz	
44	Tadeusz Karas	Čeĥio			karastad@gmail.com	
45	Janusz Robionek	Pollando			robj@g02.pl	
46	Jiří Studený	Čeĥio	75103 Majetin, U Sokolovny 316		stud.jiri@seznam.cz	
47	Pavla Studená -	Čeĥio	75103 Majetin, U Sokolovny 316		stud.jiri@seznam.cz	
48	Maria Niemyska	Pollando			niemyska.m@interia.eu	
49	Grażyna Barszczewska-Banel	Pollando				
50	Maria Sabanda	Pollando			flaum@tlen.pl	
51	Patrick Sébastien Mbonsele Moyame	DR Kongo				
52	Moliere Ngangu Nduantoni	Pollando				
53	Bakidila Ngangu	Angolo	Bairro Fubu, casa n 00240 Luanda		hngangujunior@gmail.com	+244-937738246

54	Noella Fatuma Misenga	DR Kongo			
55	Ngindamene Josephine Nkuansambu	Dem. Resp. Kongo	Kimuisi Nr.03, Q.kimbwala, C/ Mont-Ngafula, 00243 Kinshasa	nikinshasa@gmail.com	+243-850747888
56	Nkayilu Don De Dieu Ngangu	Dem. Resp. Kongo	00243 Lukala, Camp Cilu I Nr.25/A, Q.Wwumba-Lukala	donngangu5@gmail.com	
57	Teresa Kurtowicz-Nemere	Pollando		tresa.nemere@op.pl	
58	Anna Sztamborska	Pollando		Aniszi@wp.pl	
59	Jerzy Parys	Pollando		j.parys@gazeta.pl	
60	Cecylia Hlebowicz	Pollando			
61	Małgorzata Markowska	Pollando			
62	Halina Lubecka	Pollando			
64	Wojciech Bardzik	Pollando			
65	Ewa Sak	Pollando			
66	Janina Baranowska	Pollando			
68	Raisa Bondar	Pollando			
69	Stefania Romanowicz	Pollando			
70	Barbara Podolska	Pollando			
71	Henryk Jobs	Pollando			

Honora Komitato	· 3
Pri la organizantoj	· 5
Kongresejo	· 8
Programtabelo	· 10

Priskribo de la programeroj

5.08.2023, sabato. Historio de la urbo Bjalistoko	· 15
6.08.2023, dimanĉo. Bjalistoko	· 17
7.08.2023, lundo. Tykocin	· 19
8.08.2023, mardo. Wasilków	· 24
9.08.2023, merkredo. Kruszyniany	· 32
10.08.2023, ĵaŭdo. Bjalistoko	· 37
11.08.2023, vendredo. Supraśl	· 41

Bjalistokaj ZEO-j	· 45
Listo de la Kongresoj de KELI	· 47
Listo de kongresanoj	· 50

Preĝo sub la verda standardo

L.L. Zamenhof

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta,
Al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
Hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,
Kun dogmoj de blinda fervoro:
Silentas nun ĉiu disput' religia
Kaj regas nur kredo de koro.
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,
Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,
Ni staras nun, filoj de l' tuta homaro
Ĉe Via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,
Sed ĝi sin dividis batale;
Popolo popolon atakas kruele,
Frat' fraton atakas ŝakale.
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,
Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
Redonu la pacon al la infanaro
De l' granda homaro!

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunuigi l' homaron.
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron;
Donacu Vi benon al nia laboro,
Donacu Vi forton al nia fervoro,
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
Nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos;
Ĝi signas la bonon kaj belon.
La Forto mistera de l' mondo nin benos,
Kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero.

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,
Antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro
Al frata la celo ni iru obstine
Antaŭen, senfine!

Gravaj kontaktinformoj

Se venos danĝero, neceso de kontakto...

La organiza teamo estas atingebla surloke
kaj ĝiaj reprezentantoj – per poŝtelefonoj:

Elżbieta Karczewska	+48 791 856 034
Nina Pietuchowska	+48 508 868 735
Jarosław Parzyszek	+48 509 339 017

Retpoŝtadreso pri kongresaj aferoj:
kristana-kongreso@espero.bialystok.pl

Ĉiam aktualan programon vi trovos ĉe la retejo:
espero.bialystok.pl/keli/programo

Adreso de la kongresejo:
Ul. Warszawska 46, 15-077 Białystok